



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN



ĜENERALA KUNVENO de ESPERANTO-NORMANDIE

en LE HAVRE LA 22an de MARTO 97

Nia Honorprezidanto Maurice HUET malfermis la kunvenon je la 15a horo kaj salutis la ĉeestantojn.

Sinjoro POTTIER, nune samtempe prezidanto kaj sekretario, prezentis la agadraporton, bedaŭrante ke depost nia pasintjara ĝenerala kunveno, la agado estis nesufiĉa pro diversaj cirkonstancoj, inter aliaj pro la akcidento okazinta al li dum Majo kaj kiu devigis lin resti en lito dum pluraj monatoj. Pro tio, nur unu komitatkunveno okazis dum la jaro, la 12an de Oktobro en Yvetot, kaj ĝi celis precipe difini la rolojn de la novaj estraranoj, la lokon kaj daton de la venonta ĝenerala kunveno kaj pridiskuti la rilatojn inter U.N.E. kaj la Normanda Federacio de UFE, kiuj montriĝis tute bonaj, despli ke la estraranoj de ambaŭ asocioj estas nuntempe la samaj. La komitato ankaŭ pridiskutis la staton de la financoj kaj diversajn projektojn, inter aliaj la helpon kiun ni povos alporti al la ekspozicio organizota de Mouloud Touileb en Fécamp fine de oktobro en la kadro de la tago de la radioamatoroj. Ni ankaŭ diskutis tiam pri la bulteno kaj pri diversaj aferoj.

Fakte, ĉi-jare, la bulteno estis la ĉefa laboro de la asocio kaj ĝi regule aperis 4-foje kun kontentiga aspekto kaj enhavo. Tamen, kvankam ne tre rimarkindaj, la aliaj taskoj de nia ...

komitato ne estis nulaj. Efektive, ĝiaj membroj helpis al la organizado de la ekspozicio en Fécamp kaj Soj Quillaud, Pottier havis kontaktojn kun germanaj samideanoj pri ĝemelĝoj inter urboj de Malalta Saksio kaj urboj de Normandio; sed bedaŭrinde montriĝis ke ĉiam kiam estas esperantistoj en unu el la ĝemelitaj urboj; ili mankas en la alia. S-ro Pottier serĉis samideanojn en la ĉefa urbo Kyjov kiu verŝajne baldaŭ ĝemeliĝos kun Yvetot sed sen vera sukceso. Li ankaŭ skribis dum Aprilo al "Science et Vie" por defendi Esperanton kaj li havis eblecon paroli pri Esperanto dum 2 minutoj al la publiko dum la festa vespero de T. Téléthou en Yvetot. Ni ankaŭ respondis al personoj kiuj petis informojn. Do nia agado ne estis tute nula sed per vigligi ĝin, ni bezonas novajn kandidatojn al la komitato, preferinde junajn kun freŝaj fortoj kaj ideoj.

Post tiu raporto, S-ro Quillaud legis la financajn raportojn de UNE kaj de la Normanda Federacio.

La raportoj estis unuanime aprobitaj.



Poste, ni diskutis pri la bulteno kiu unue estas redaktata kaj tajpata de Pierre Quillaud. Poste Pierre Lemarchand kaj Maryse reduktas la formaton, presas kaj sendas la bultenon. Laŭ, la ĝenerala opinio, ĝi havas bonan aspekton kaj enhavon, sed ni tamen povus igi ĝin pli interesa se ni ricevus el la grupoj pli da artikoloj. Fine de la diskuto, Yves Nicolas gratulis pri la bulteno kaj insistis pri la fakto ke ĝi estas nia nura kaj nepre necesa ligilo.

Post tio, la grupoj raportis pri sia vivo: la plej vigla kaj agema estas senkonteste tiu de Hérouville (14), kiu, krom la kursoj kaj kunvenoj akceptis samideanojn kaj prelegistojn el Sankt-Peterburgo kaj el Zairio, sendis 2 personojn al Hungario kaj partoprenas ĝemelasocion kun rusa urbo Tiĥvin. En Grand-Quevilly, okazas ĉiujaraŭde, kunvenoj por paroli kaj praktiki Esperanton. En Le Havre, la grupo kunvenas regule ĉiumonate. En Fécamp, okazis fine de Oktobro interesa ekspozicio organizita de niaj geamikoj Touileb kiuj ankaŭ efike agas en la lernejoj. En Yvetot, la kursoj ne rekomenciĝis, sed la grupo ricevis proponon, fare de la urbestro, pri organizado de informado pri Esperanto en la lernejoj.

Fine, la ĉeestantoj renovigis(?!) la komitaton, sed pro manko de novaj kandidatoj, ĝi fakte restis senŝanĝa!!!

S-ro Nicolas sugestis ke ni kreu teamon de respondeculoj el ĉiuj grupoj por organizi prelegvojaĝojn, leterkampanjojn al oficialuloj, ktp...Ni provos organizi tion dum la jaro.

La kunveno finiĝis je la 17a horo kaj estis sekvita de tre agrebla kaj amika vizito de Doktorino Nelli Kublanova el Rusio.

Pierre POTTIER



FOTO DE LA PARTOPRENINTOJ

Eùrop-Unia Esperanto-Kongreso

La Tria Eùropa Kongreso okazis de la 16a ĝis la 19a de Majo en Stuttgart. Tiu germana urbo en federacia lando Baden-Virtembergo bone taŭgis por akcepti tian aranĝon ĉar ĝi situas sufiĉe centre de la nuntempa Eùropa unio. La urbo mem, ĉirkaŭita de Riesling vinberejoj, grandparte detruita dum la Dua Mondmilito, estis bele rekonstruita kun grandaj komercaj avenuoj, agrablaj parkoj kaj placoj. Imagu tramojn kaj biciklojn, modernajn muzeojn, avangardajn statuojn por urbanaj bunte vestistaj. Ne mankas kurtaj roboj, ringoj fiksitaj sur junaj nazoj aŭ mentonoj, verdaj aŭ bonbonkoloraj hararoj. Kaj dolĉa biero por elteni varman sunon.

Turismemaj kongresanoj vizitis multnombrajn vidindaĵojn en Stuttgart mem aŭ en la regiono (Tübingen). Studemaj kongresanoj senlace kunvenis por debati en la ĉefa salono pri la temo "Eùropo Kien ?" kun interesaj intervenoj de germanaj politikistoj. Tre efikis tuja al- kaj eltrduko. Tre diversaj temoj estis pritrakitaj :historio, eŭro, komercaj kaj homaj rilatoj, malfermo al orienteùropaj landoj, ktp. Ne mirinda afero estis, ke esperantistoj subtenis, kelkfoje brile (inter ili Zlatko Tišljar, Kroato loĝanta en Slovenio), la ideon de neŭtrala lingvo por Eùropo, sed sur tiu tereno la invititaj politikistoj ne komunikis fervoran aprobon... Esperantistino proponis, ke tiu neŭtrala lingvo estu la latina kiun tuteŭropa minoritato flue parolas. Ĉu la latina kiel neŭtrala lingvo por Eùropo pro tio ke ĝi jam forte kontribuis al konstruo de la nuntempaj eùropaj lingvoj ? Ĉu Esperanto povus esperi resti neŭtrala lingvo por Tuta Mondo se ĝi iĝus lingvo de politika kaj ekonomia bloko ? La nivelo de la debatoj estis rimarkinde alta, kun multaj esperantistoj lingvonivele tre spertaj.

Okazis ankaŭ aliaj aranĝoj pri filatelio, instruo, kurso de ŝvaba lingvo dialekto de Stuttgart, kiujn oni diskrete forlasi por trafoliumi librojn en la kongresa librovendejo. La kongreso, do, kulture riĉis, sed mankis lokoj kaj aranĝoj por faciligi babiladojn kaj interkonatiĝojn. Organizati komunajn tagmanĝojn tre certe donas pretekston -ĉefe por novuloj- por ekparoli kun nekonata najbaro...

Pli ol 350 personoj aliĝis al la kongreso el 22 landoj. Inter ili, kvindekda Francoj, kaj 4 Normandoj el Hérouville : Patrick Etienne, Françoise Marie, Michelle Paumier kaj Yves Nicolas. Unuiĝo Franca por Esperanto (U. F. E.) organizis ĝeneralan kunvenon por prezenti lastjaran kaj nuntempajn agadojn. Restrukturo rilate al federacioj estas pripensata ĉar pluraj, inter ili la normanda, ne bone funkcias, aŭ ne sufiĉe plenumas sian rolon kiel perilon inter la lokaj grupoj kaj la nacia strukturo. Mi salutis la ĉeestantojn nome de nia asocio, dankante la organizon de prelegvojaĝoj ĉiam tre utilaj por la lokaj grupoj. Sro Clopeau invitis UFE organizi sian venontjaran kunvenon kun SAT-Amikaro apud St Brieuc. Preskaŭ ĉiuj aprobis tiun proponon. Estus vere tre simbola kaj pozitiva gesto por nia movado kiu bezonas unuecon en diverseco. Nia Normanda Unuiĝo jam de longe, eĉ de ĉiam, elmontris, ke tiaj rilatoj ne ĝenas la sendependecon de tiu aŭ tiu-ci. Ni esperu, ke la estraraj strukturoj de SAT-Amikaro kaj de UFE akceptos tiun proponon. Tuj post la ĝenerala kunveno, UFE prezentis per videokasedo la kongreson de UEA okazonta en 1998 en Montpellier.

La organizantoj de tiu tre pozitiva Eùropa Kongreso regalis nin per bonetosa bufedo kaj teatraĵo, "Kia koincido", de Ionesko. Ĝis la venonta, en Oostende en la jaro 2 000a !

Y. Nicolas

EUROPARLEMENTAIRES ET ESPÉRANTO

Europarlementaires qui, à divers grades, pensent que l'espéranto pourrait d'une certaine manière aider à la solution des problèmes linguistiques à l'Union Européenne

SELON LES PARTIS

ETAT du 01/03/97

Groupes politiques au Parlement Européen	Nombre d' Europarlementaires	Favorables à l'espéranto	%
1) UPE Union Pour Europe	57	15	26,31 %
2) ELDR Parti Européen des Libéraux Démocrates et Républicains	43	11	25,58 %
3) ARE Alliance Radicale Européenne	20	5	25,00 %
4) V Verts	27	6	22,22 %
5) PSE Parti des Socialistes Européens	215	43	20,00 %
6) PPE Parti Populaire Européen (Chrétien-Démocrate)	182	25	13,73 %
7) NI Non Inscrit	49	3	6,12 %
8) GUE Gauche Unitaire Européenne NGL Gauche Verte Nordique	33	2	6,06 %
	626	110	17,57 %

SELON LES PAYS

Pays	Nombre d' Europarlementaires	Favorables	%
1) Irlande	15	13	86,66 %
2) Belgique	25	15	60,00 %
3) Gde Bretagne	87	30	34,48 %
4) Italie	87	19	21,83 %
5) Suède	22	4	18,18 %
6) Luxembourg	6	1	16,66 %
7) Finlande	16	2	12,50 %
8) France	87	10	11,49 %
9) Autriche	21	2	9,52 %
10) Portugal	25	2	8,00 %
11) Espagne	64	5	7,81 %
12) Danemark	16	1	6,25 %
13) Allemagne	99	6	6,06 %
14) Grèce	25	0	0,00 %
15) Pays-Bas	31	0	0,00 %
	626	110	17,57%

EL : "ESPERANTO - INFOS".

PROSPECTIVE DU NOUVEL ORDRE LINGUISTIQUE INTERNATIONAL

On entend souvent dire que le prochain siècle sera le siècle de l'Asie. Economiquement, l'Asie progresse et sera vraisemblablement force dirigeante mondiale du 21^e siècle. Pour cela, les Etats-Unis et d'autres pays d'Amérique désirent un codéveloppement avec les pays asiatiques au sein de la Coopération Economique Asie-Pacifique, et les dirigeants des pays européens souhaitent une coprosperité au sein de la rencontre Euro-Asiatique. Il semble que le monde entier reconnaisse déjà que le 21^e siècle sera l'ère de l'Asie, mais seulement en économie.

Mais la plus grande faiblesse de l'Asie dans son rôle de guide mondial est la langue. Sous l'ordre linguistique mondial actuel, l'Asie ne pourra être une force ni dirigeante, ni collaboratrice, mais sera à la traîne des pays puissants au point de vue linguistique.

Nous vivons actuellement dans le monde moderne qui exige démocratie, justice, égalité, liberté et droits de l'homme. Les vraies démocratie et égalité incluent la démocratie et la liberté linguistiques, et les vrais égalité et droits de l'homme comprennent les droits des langues. A cause de cela, toutes les déclarations ou chartes des organisations internationales, y compris la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme des Nations Unies, interdisent la discrimination des hommes sur la base, entre autres, de la langue. L'ONU a beaucoup contribué durant les 50 dernières années au bien-être des physiquement faibles, mais n'a pu le faire à l'égard des droits des langues des nations linguistiquement faibles.

Le monde est régi par les langues des nations fortes politiquement, et les députés ou les représentants nationaux au sein des organisations internationales ne peuvent s'exprimer

dans leur propre langue mais dans les premières, exigées du pouvoir politique.

La limitation de la communication internationale à une ou quelques langues nationales, non seulement entrave une communication égalitaire et démocratique et exige une invasion culturelle, mais encore est la cause d'une régression et d'une absence d'évolution des langues et cultures nationales.

L'ordre linguistique mondial actuel est non seulement incapable de changer les droits linguistiques qui se détériorent, mais en accélère au contraire la régression. Ni l'usage mondial de quelques langues nationales, ni un progrès des moyens de communication, ni une découverte de nouvelles méthodes de traduction ou d'enseignement des langues ne changeront la tendance.

Le monde a besoin d'un nouvel ordre mondial linguistique (NOML).

Dans ce NOML, tous les hommes utiliseront une langue auxiliaire commune, neutre, internationale. Sous ce NOML, l'humanité pourra créer une base neutre sous laquelle divers groupes ethniques humains pourraient fraternellement s'entretenir en paix, sans opposer leurs

particularités ethniques. Le NOML garantira les droits linguistiques et une communication internationale démocratique, facilitera une diversité linguistique et une éducation supranationale, et contribuera à l'émancipation humaine des problèmes liés à la communication.

Sous ce NOML, la diversité des langues ne séparera plus les peuples mais les unira.

Actuellement les organisations internationales affrontent sérieusement le problème de la langue. L'Union Européenne utilise actuellement 11 langues comme langues officielles, et tous les documents et discours officiels doivent être traduits en ces 11 langues. Presque la moitié du budget est absorbée par le service linguistique. C'est pour cela que 83 membres (14 %) (*) des 627 Parlementaires Européens sont «plus ou moins» favorables à l'usage de l'Espéranto comme langue auxiliaire internationale.

Actuellement l'ONU étudie sérieusement la manière d'améliorer son fonctionnement et d'épargner des dépenses. Il a déjà été proposé au Conseil Economique et Social de l'ONU d'adopter un ordre du jour à sa prochaine assemblée pour discuter «d'une langue auxiliaire internationale». En plus des 6 langues officielles (anglais, français, russe, chinois, espagnol et arabe) utilisées à l'ONU, tous les documents officiels sont traduits en allemand aux frais de l'Allemagne et de l'Autriche. Le Japon passera vraisemblablement bientôt un accord similaire avec l'ONU.

En août 96, le Ministère Chinois des Affaires Etrangères a décidé que, dès le mois de septembre, il organiserait sa conférence de presse uniquement en chinois, sans traduction anglaise. La décision fut louée par le RENNIN RIBAO, l'organe du Parti Communiste Chinois, comme le signe que la Chine est en passe de devenir une puissante nation. Le journal dit dans son éditorial de la rédaction : «La position de la Chine sur la scène internationale s'élève de jour en jour, et le chinois devient une langue très influente dans le monde... **Quand une nation est respectée sur le plan international, il est naturel que sa langue le soit aussi.**». D'autre part, en Europe, lors des dernières manœuvres de l'OTAN, le problème linguistique a été la cause de contre-performances. Pour ce motif, il est proposé que l'anglais soit utilisé comme langue commune au cours des exercices militaires de l'OTAN. De tels problèmes nous révèlent déjà la situation chaotique de l'ordre linguistique international. Le temps pour changer cet ordre-là mûrit de plus en plus.

Le Docteur Nitobe Inazo, Secrétaire Général Adjoint de la Société des Nations, s'efforça déjà en 1921 de construire un nouvel ordre mondial linguistique. En 1926 déjà, M. Kijomi Rokuroo écrivit à «la Revue Orientale» (la Revue Orientale) pour que l'Espéranto soit une langue commune aux asiatiques, spéciale pour les échanges entre Coréens et Japonais. Nous pouvons dire la même chose aux Chinois.

L'expression de la consécration de la communauté espérantiste à la construction du NOML est à la base du manifeste de Prague proclamé par le 81^e Congrès Universel d'Espéranto, et la Résolution du Congrès a invité toutes les organisations internationales et les instances politiques concernées par les langues à une collaboration avec le mouvement espérantiste international



Prof. Lee Chong-Yeong au Congrès Esperanto d'Asie

nal pour la «*construction d'un ordre linguistique plus juste et plus démocratique*». Le Comité de UEA (Association Universelle d'Espéranto) a approuvé le lancement d'une campagne qui vise à élever le prestige de la langue internationale, principalement auprès des hommes et des instances ayant le pouvoir de décision, ainsi qu'à faire prendre conscience aux organisations internationales des possibilités pratiques que présente la langue internationale. Le Comité a fait appel aux associations spécialisées et nationales de la communauté Espérantiste afin qu'elles se tiennent prêtes à tendre leurs forces pour porter ensemble durant le prochain siècle la langue internationale à cette position plus solide que mérite l'Espéranto et qui semble maintenant accessible.

Cependant, nous connaissons bien la réalité politique de l'univers linguistique international. Nous devons analyser avec raison la réalité, persuader amicalement les organisations concernées, et fortifier pas à pas un soutien politique. Nous avons l'intention d'en appeler à l'ONU et au Parlement Européen pour les pousser à étudier et débattre d'une langue auxiliaire internationale. Nous avons besoin du soutien actif et d'une participation de tous les espérantistes à cette campagne. Voici ce que je demande

aux espérantistes isolés, aux associations nationales, aux associations spécialisées, de UEA et aussi aux autres organisations espérantistes radios et journaux qui agissent indépendamment :

Écrivez au moyen de communication de masse en langue nationale et informez sur le Manifeste de Prague, la Résolution du Congrès, le concept, le besoin et les possibilités du NOML.

Écrivez à vos représentants nationaux à l'ONU et à vos députés au Parlement Européen au sujet du besoin et de la possibilité pratique d'une langue auxiliaire internationale, et demandez de soutenir la proposition sur l'étude, l'essai d'utilisation et d'Enseignement de l'Espéranto, comme langue-pont internationale.

Si nous considérons la pression croissante du problème linguistique sur ces organisations internationales, un NOML semble devoir être accepté.

Que les asiatiques soient les pionniers de la construction du NOML qui semble accessible ! Ceci est la mission digne de fierté des espérantistes asiatiques au cours du 21^e siècle !

*Congrès Asiatique d'Espéranto
à Shanghai, Août 1996
Discours du Professeur
Dr LEE CHONG-YEONG
Président de UEA*

(*) Au 01.03.97, 110 députés, 17,57 %

IMPRESSIONS SUR L'ASSEMBLEE GENERALE

+++++



Tant pis pour ceux qui ne sont pas venus! Ils ont manqué une réunion bien sympathique et merci aux amis Havrais qui l'ont bien organisée. Ce fut une rencontre amicale entre "samideanoj" du Havre, de Rouen, de Caen, d'Yvetot et autres lieux. La réunion commença par un repas en commun dans un restaurant très bien choisi pour sa situation, son menu et son prix.

L'Assemblée Générale, -elle même-, eut lieu dans une belle salle de l'HOTEL DES Sociétés Savantes; c'est là que se réunissent chaque mois nos amis Havrais. Nous étions entre 20 et 30 participants et l'on peut regretter, avec nostalgie, les congrès normands d'après -guerre qui regroupaient 150 à 200 participants. Un Congrès, c'est une Assemblée Générale avec en plus une partie festivités: banquet, vin d'honneur à la mairie, spectacles du samedi soir, excursions, etc... Nos forces ne nous permettent plus d'organiser un congrès; nous devons nous contenter d'une assemblée de quelques militants.

Vous venez de lire dans les pages précédentes le compte-rendu de cette Assemblée Générale. Alors qu'une solution au problème linguistique s'impose de plus en plus au niveau européen; alors que les organisations nationales Espéranto-France et SAT-Amikaro progressent et répandent avec succès l'idée d'une langue commune (et non unique) pour l'Europe, alors que d'autres organisations régionales obtiennent de francs succès, notre Union Normande stagne lamentablement et ressemble de plus en plus à un véhicule au moteur délabré!

Depuis plusieurs dizaines d'années, ce sont les mêmes qui sont aux commandes d'Espéranto-Normandie. Dans n'importe quelle association, le renouvellement des dirigeants est indispensable; sinon, c'est la stagnation, la régression, la lassitude, le manque d'enthousiasme, l'envie de tout lâcher qui provoqueront la dissolution de l'association à moins que des militants nouveaux ne prennent la décision de remplacer la vieille équipe!

Je ne veux cependant pas finir cet article par une note pessimiste. Quelques groupes fonctionnent bien. Le travail principal doit être fait à la base et nous devons démontrer aux non-espérantistes que l'Espéranto, ça marche en organisant le plus souvent possible des réunions avec traduction en français lorsque nous recevons la visite de conférenciers étrangers. Prenons exemple sur le groupe d'Hérouville. Plus nos groupes locaux seront forts, plus nous y trouverons de militants pour s'occuper de notre Union des Espérantistes de Normandie.

Petro KIJO

KIUJ ESTAS EN LA KOMITATO DE ESPERANTO-NORMANDIE?

Estis elektitaj en Rouen en 1996:

Jean GIBAUD el Le Havre

Pierre POTTIER el Yvetot

Pierre QUILLAUD el Grand Quevilly

Marco TEANI el Canteleu



Pierre POTTIER estis Prezidanto kaj Sekretario

Pierre QUILLAUD estis kasisto kaj Bultenredaktoro

Pro tio ke neniu nova kandidatigis, dum la kunveno 1997 en LE Havre, estis decidite plilongigi la postenon de la samaj dum ankoraŭ unu jaro. Nur Marco Teani estas nova komitatano sed li ne povis ĉesti la solan komitatkunvenon kiu okazis.

COTISATIONS: Nous avons reçu pour 1997 les abonnements de:

Gesinjoroj : Artus, Bataille, Bessière, Boucher, Canu, Caron, Casassus, Chalm, Colombel, Chapotte, De France, Deuff, Dubois, Duflo, Dufossé, Evrard, Gibaux, Gior-dano, Guérout, Guerre, Guilmot, Guionie, Haulard, Helbert, Huet, Jean, Jourdain D, Jourdain M.L., Jouvin, Lamy, Langanay, Lebrun, Lefebvre, Legros, Lehericey, Lemarchand, Leroy, Levesque, Lévy, Loisel, Magerel, Mary, Masseron, Mendès, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Ordonaud, Peltier, Quillaud, Quillet, Robiolle, Roblin, Rousseau, Séry J, Séry S, Tanguy, Touileb, Zilliox

SITUATION FINANCIERE 1996

En la bulteno n° 191 de Marto 1997, vi povis legi la finanĉan raporton kiu estis akceptita dum la ĝenerala kunveno en Le Havre. Bonvolu korekti la jaron: temas pri "Situation Financière 1996" kaj ne 1995.

VIVO DE NORMANDAJ GRUPOJ

SUD-NORMANDIO MANCHE:

Kiu volas helpi al mi krei normandan Esperanto-Asociacion inter Granville kaj Avranches?

Mi estis Prezidanto de la Esperantasocio en Villejuif (94) kaj ĵus alvenis en Saint Michel des Loups (50). Mi pensas ke ni devu kuniĝi kelkafoje por montri ke ESPERANTO DAŬRE VIVAS.

Do, bonvolu skribi al mi por helpi min krei tiun asociacion:

Christian LEVESQUE Les Epinettes
Saint Michel des Loups 50740 Carolles
Tél. 02 33 91 75 08

La limoj ne estas difinitaj sed ne devas esti tro malproksime por ke la distancoj ne estu problemoj

FECAMP:

Bonvolu noti sur via kalendaro la daton :25a kaj 26a de Oktobro 1997 Tiam okazos por la 3a fojo la ekspozicio pri radiokomunikado. Ni starigos budon; ni petas vian helpon kaj ni akceptos plezure multajn vizitantojn.

Nun en urba biblioteko, legantoj povas pruntepreni 4 librojn pri Esperanto: "L'ESPERANTO"(Collection "Que sais-je"), LE DEFI DES LANGUES, L'HOMME QUI A DEFIE BABEL, QUE VIVE LA LANGUE FRANCAISE QUE VIVE L'ESPERANTO! Ĉiu grupo devus klopodi al sia urba biblioteko por akiri similajn librojn!

A l'occasion de la Fête de la Trinité, la foire commerciale a installé dans les rues piétonnes de Fécamp des haut-parleurs branchés sur la radio locale RVS . A 17h45, on passe un sketch de Pierre Desproges extrait de son "Dictionnaire superflu à l'usage de l'élite et des biens nantis". Lettre "Z".Durant 5 minutes, il parle de...Zamenhof, son oeuvre, sa vie. C'est émouvant et percutant comme du Desproges!!! Et il y eut bien des auditeurs!

Mouloud



HEROUVILLE:

Raporto pri la restado de ZDRAVKA BOJĈEVA: La akcepto de Zdravka okazis tuj post la 1a de Majo, precize kiam plej multaj ferias dum kelkaj tagoj. Plie, ni iom suferis pro la prelegvojaĝa regulo: "Ju pli da kluboj en la rondo, des malpli da tempo kun la preleganto". Pro tio ni rezignis organizi publikan kunvenon. Alekstera konatigo do tute fiaskis: neniu artikolo en la loka gazetaro.

Estas des pli domaĝe ĉar la interveno de Zdravka alte valoras kaj meritis prelegon en nia Muziklernejo aŭ kadre de la tiel nomata "inter-aĝa" "universitato". Sed vere bonŝancaj ni tamen estis, ĉar gastigi ŝin signifis plezuron por ĉiuj lokaj esperantistoj. La vizito de eksterlandano, altnivela esperantisto, ĉiam kuraĝigas la kursanojn. Zdravka bone animis vespermanĝon pri Bulgario, kiun partoprenis 14 personoj.

Poste, ni vizitis Caen sub maje dolĉa ĉielo: la vivo de Vilhelmo la Konkeranto ne plu havas sekreton por ŝi.

Ni projektis vizitojn en la regiono dum la morgaŭo, bedaŭrinde, ŝi jam rendevuis en Parizo.

Ni volonte, denove kaj pli longe gastigus tiun fervoran kaj ĉarman samideaninon, kiu cetera anoncis sian deziron viziti Rouen okaze de venonta vojaĝo.

Multe dankon al UFE pro la organizo de tiu nova prelegvojaĝo.

Yves NICOLAS

GRAND QUEVILLY:

Nelli KUBLANOVA restis 3 tagojn en Rùena regiono. Antaŭ publiko, ŝi prelegis. Bonvolu legi apudan artikolon pri tiu interesa prelego.

Daŭras semajnaj kunvenoj en "Centre Socio Culturel"

Kelkaj membroj de la grupo partoprenos vojaĝon al Litovio ĉi-somere; ilie restados ĉe litovaj esperantistoj. Unu partoprenos Universalan Kongreson en Aŭstralio kaj paro ĉeestos SAT KONGRESON en Augsburg.

GRAND-QUEVILLY SUR... NEVA !!!

La matin du Samedi 22 Mars Nelli KUBLANOVA s'envolait de Saint-Petersbourg. Elle arrivait dans l'après-midi au Havre où se tenait l'Assemblée Générale de l'Association ESPERANTO-NORMANDIE. Après un court séjour à Caen, elle arrivait à Grand-Quevilly le jeudi 27 Mars, invitée par la section Espéranto de l'Amicale Bastié-Calmette-Salengro; elle fit un exposé au Centre Socio Culturel François Mitterrand. Le sujet de sa causerie était «Les Artistes Français qui contribuèrent à la construction de Saint-Petersbourg».

Saint-Petersbourg qui fut Pétersgrad, puis Léninegrad, a repris son ancien nom qui fit sa célébrité. Cette ancienne capitale de la Russie Tsariste fut fondée il y a 300 ans par Pierre le Grand. Malgré les destructions de la guerre, malgré l'absence de moyens financiers due à la situation économique chaotique actuelle, Saint-Petersbourg reste une des plus belles villes d'Europe, c'est la plus occidentalisée des villes russes. Pierre le Grand fit appel à de nombreux Français et Italiens pour la construire.

Grâce à ses diapositives, Nelli KUBLANOVA nous donna l'occasion d'admirer: les monuments, les palais, les ponts, les églises et les larges avenues harmonieuses, de longer le fleuve NEVA et les nombreux canaux qui font de cette ville "la Venise du Nord". Au passage, elle cita les artistes français qui contribuèrent à l'édification des monuments:

- Jean-François THOMON (1759 - 1813) architecte de la Cour Impériale construisit la Bourse Maritime et un temple à

Pavlosk.

- Etienne FALCONET (1716 - 1791) sculpteur dont le chef-d'œuvre est la statue équestre de Pierre le Grand, statue en bronze sur un énorme rocher.

- Auguste DE MONTFERRAND (1786 - 1858) architecte qui construisit le Palais Lobanov et surtout élabora les plans de la Cathédrale Saint-Isaac et érigea la colonne Alexandrine et l'Hôtel Demidov.

De nombreux autres artistes français contribuèrent au renom de cette ville. N'oublions pas les maîtres de ballets du Théâtre Impérial: Marius PETIPA (la Belle au bois Dormant, le Lac des Cygnes) et Charles-Louis DIDELOT.

Cet exposé rappela des souvenirs à ceux qui avaient déjà visité Saint-Petersbourg; il donna aux autres le désir de s'y rendre. Nelli KUBLANOVA ne parla pas français; elle fit son exposé en langue internationale Espéranto.

Elle passa quelques jours dans notre région avant de participer au Congrès National des travailleurs espérantistes (SAT) à Limoges. Depuis, elle continue son voyage en France et est hébergée bénévolement dans des familles espérantophones et ce n'est qu'à la fin mai qu'elle retournera en Russie.

Ce voyage en France était le rêve de sa vie. Bien que Docteur en stomatologie, le montant de sa pension est tellement bas qu'elle n'aurait pu le réaliser sans la fraternité des Espérantistes qui ont su donner un contenu réel au mot "internationalisme".

P.Q.

VOĈDONADO POR NOVAJ PARLEMENTANOJ:

Kandidatiĝis nia membro kaj nova estrarano Marco TEANI. Bedaŭrinde, li ne estis elektita.

Ni memorigas al vi ke dank'al li aperis tutpaĝa artikolo favora al Esperanto en la gazeto de Verduloj de Alta Normandio.

Cu estis aliaj esperantistaj kandidatoj?

Pri "MAQUEREAU"

La franca vorto "maquereau" havas du senrilatajn sencojn kaj du malsamajn respondantajn etimologiojn, kiuj hazarde konverĝis al nia ununura franca vorto. La unua senco estas tiu de difinita speco de fiŝo, (skombro en Esperanto); la dua indikas la fian metion de prostituisto.

La du etimologioj retroviĝas en du esperantaj vortoj, kiuj ambaŭ iom similas je la franca vorto "maquereau", sed kiuj suferis semantikan drivon. Pripensu. Cu vi divenas, Jen ili:

- a)-La latina "macula" = makulo, pro la makuloj kiuj kovras la haŭton de la skombroj!
- b)-La ĝermana "makelare" (germane kaj ruse "makler"), kiu eniris esperanton en "makleri", (profesie servi kiel peranto inter demandantoj kaj proponantoj de kiu ajn servo) !

H.ROUSSEAU

KONGRESO DE SAT-AMIKARO:

Grandan sukceson havis la 52a kongreso de SAT Amikaro en Limoges kun preskaŭ 300 partoprenantoj el kiuj 5 ge-Normandoj. Organizado estis bona. Diskutoj kaj prelegoj estis interesaj kaj viglaj. Tre agrabla kaj entuziasmigaj estis la prezentado fare de teatra trupo: "LA KOMPANOJ" kiuj revivigis la ĉerizan tempon de: LA PARIZA KOMUNO, KANTANTE !

La redaktoro petas vian pardonon pro malpli bona aspekto de tiu bulteno sed... kulpas la komputero ...kiu paneas!

Al ĉiuj, mi deziras agrablajn feriojn. Profitu la someron por praktiki Esperanton!

52-a KONGRESO
kun
infana
kongreso
SAT-AMIKARO
ESPERANTO
1997
LIMOGES
29-30-31 MARTO